

la naska fasko

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero tri
2009-07-01
merkredo

Kio okazos hodiaŭ?

- ★ **Posttagmezo: libera**
- ★ **7:30 ptm: Doroteo prezentas**
Kie: la komuna salono
Temo: “Aventuroj pri diversaj kulturoj en Esperanto”

Pri la nomo “NASK”

de Reni PORTER

Mi tre ŝatas la nomon de nia kursaro. Mi estas nordamerikano, do mi estas hejme ĉi tie. Se nia nomo estus *Kursaro de Kalifornio* aŭ *USA*, mi estus nur vizitanto (laŭ la nomo). Kaj *somero* estas magia vorto en Kanado. Ni revas pri somero dum duono de la jaro. Eble en suda Kalifornio la sezonoj estas nur bagatelo, sed kiam la vintra temperaturo estas sub nulo dum monatoj, somero gravas.

Plaĉas al mi, ke nia nomo ne uzas la vorton *internacia*. Kiam individuoj el multaj nacioj renkontiĝas, tio ne estas vere internacia. Kiam Eduard kaj mi babilas, Belgujo kaj Kanado ne partoprenas—nek la registaroj nek la landoj. Kiam Spomenka instruas nin, Kroatujo ne estas tie. Ofte individuoj rilatas pli bone ol iliaj nacioj. Tiam, ili ne estas nur sennaciaj, sed supernaciaj.

[*Hieraŭ komencis aperi ĉe la redakcio pluraj poemoj fare de niaj lernantoj. Dankon—kaj “Bis!” (Daŭrigu la verkadon!)*]

Du poemoj de Niko

de Niko KALIVODA

mol-estaj de-monoj

mol-estaj de-monoj fi-erus (aŭ de-lirus):
pur-puraj lum-brikoj mis-ilojn re-spektas,
de-pendas d' alt-aro am-ara
en art-ritaj ark-adoj kaj rif-uzejoj.

sentitola

mavaj mevoj movu
knabon kanape kanabumantan
al amplekso kaj amplekto.

La limeriko de la falsaj amikoj

de Anonimulo

[*Lastatempe en la meznivela kurso oni studis liston de “falsaj amikoj”: Esperantaj vortoj kiuj ofte erarigas parolantojn de aliaj lingvoj —ĉiukaze, parolantojn de la angla.*]

La cinika adepto
Kaj la longa frazo
Faris “kondiĉon larĝan”
Por manĝi la vermon varman
En sian “grandan referon de la tago.”

[*Kaj la aŭtoro kaj la redaktisto invitas ankaŭ vin partopreni en la limerikumado, ĉu pri falsaj amikoj aŭ pri io ajn...*]

Friska Ve-tero

de Ellen EDDY

Verkita en la supera kurso sub la gvido de D-ro Claude PIRON, San Francisco State University, 1981

Dum ni studis en Sanfrancisko
Nin neniam trafis la risko
Sunbruli sub blua ĉiel'
Ĉar la vento blovis obstine
Kaj la dentoj klakis senfine
En densa nebula malhel'.

Jen ni legis libron Valanan
Kaj spuris nevon Karalan
Vagadis trakosme la klas'
Sintagmojn pene ni studis
Kun Tutbono lerte ni ludis
Kaj ŝvitis tra teda fatras'.

Notoj: La lasta strofo aludas al la detektivaj noveloj de Claude PIRON. "Tutbono" aludas al profesoro ĉe UCSD.



Foto de Tor KINLOK

Butikumu malmultekoste

Ĉu vi forgesis ion aŭ volas aĉeti ion malmultekoste? Troviĝas vendejo nomita *Friends Resale Center* ĉe la Internacia Centro. Ĝi situas malsupre de la kafejo kie multaj NASKanoj kafejumas dum la paŭzo, inter niaj klasĉambroj kaj *Price Center*.

La varoj estas uzitaj, sed ili havas bonan staton. La mono gajnita estas uzata por stipendioj por studentoj de UCSD kiuj studas eksterlande, kaj por fremdlandaj studentoj kiuj studas ĉe UCSD.

Horaro: 10:00 atm – 2:00 ptm marde, merkrede kaj ĵaŭde.

Gramatika angulo

Oni ĵus proponis, ke ni starigu en la *Fasko* novan rubrikon por respondi gramatikajn demandojn. La unua demando venas de Tor pri la frazo:

“Li vidis la rondan tablon en la ĉambro.”

Do, la demando estas: ĝuste kion priskribas la subfrazo “en la ĉambro”? Ĉu nepre la tablon? Ĉu ĝi povus anstataŭe priskribi la vidanton? Alivorte: leginte tiun frazon, ĉu oni komprenu, ke “li” estis en la ĉambro, kaj de tie li vidis la tablon? Aŭ ĉu “li” vidis tablon, kiu estis en ĉambro? Morgaŭ ni aperigos la respondon. (Ĉu **vi** havas demandon? Nepre sendu ĝin!)

La NASKan Faskon redaktas via afabla helpinstruisto, sed **li nepre bezonas vian helpon!** Ne timu, se vi ne sentas vin komforta pri verkado; li helpos vin korekti kaj poluri. Sendu viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn, aŭ ion ajn—perrete al [**<nask.esperanto@gmail.com>**](mailto:nask.esperanto@gmail.com) aŭ simple portu ilin piede al Asante #127.

Diegoj kaj Dietoj: La nekonata historio de San Diego

Por daŭrigi nian hieraŭan temon pri nekonataj historioj kaj lokaj nomoj, jen alia artikolo el la NASKa arĥivo, fare de instruisto Paŭlo GUBBINS el Britujo.

Survoje al Sandiego mi multe cerbumis pri la signifo kaj la deveno de la nomo de la NASK-urbo. Klare, ne estas multo alia farenda dum multhora flugo krom cerbumi. Evidente, mi diris al mi, la urbo estas fondita de ĝis nun nekonata sekto de praesperantistoj, kiuj, trovante en la regiono neniam religiajn spurojn, esprimis sian malkontenton kaj baptis la urbon Sen Diego—alivorte urbo sen dioj aŭ diegoj. Tute pardoneblas la konfuzo inter *san* kaj *sen*: ni parolas ĉi tie pri pra-, kaj do antaŭfundamenta, eĉ antaŭzamenhofa Esperanto.

Interesa teorio, sed bedaŭrinde neniel pravigebla. Esplorante la universitatan tereron, mi trovis grandan statuon dediĉitan kredeble al sun-dio. Do jen la respondo al mia cerbumado: temas ne pri urbo sendiega sed pri urbo sundiega... alivorte ne urbo senreligia sed urbo pagana. Do la ĝusta nomo de la urbo fariĝu, en bona Esperanto, kaj kun streketo, Sun-Diego.

Do tiel, malkovrinte la ĝustajn originojn de la nomo de la urbo, mi ekde nun parolos ekskluzive pri Sun-Diego. Cetere mi proponas, ke NASK-anoj verku komunan leteron (bona kaj trafa ekzerco por unu el la du grupoj) al la urbaj instancoj, atentigante pri la eraro en la literumado de la gastiganta urbo kaj insistante, ke ĝi estu tuj konata tra la tuta mondo kiel Sun-Diego.

Nur ironie estas, ke – almenaŭ ĝis nun, sabato, kiam mi kunskrapis ĉi tiujn vortojn—la suno apenaŭ sin montris. Tamen diegoj obeas al siaj, ne al niaj reguloj. Kaj sun-diegoj, sendube, ne escaptas.



Foto de Ellen EDDY

Via propra konstruita lingvo: Kial ne?

de Neal WILEY

Aparte de la naturaj, naciaj lingvoj de la mondo, ekzistas ankaŭ multaj konstruitaj lingvoj. Oni povas apartigi ilin en kelkajn specojn, kiujn mi esploras.

Al la unua, kaj kompreneble plej granda kaj grava speco apartenas “internaciaj” aŭ “helpaj” lingvoj. La celo estas simpligi la komunikan laboron kaj proksimigi kulturojn. Ekzemploj estas Esperanto, ĝia ido (kiu nomiĝas *Ido*—kiel belele), *Volapük*, *Lojban*, *Toki Pona*, ktp.


La dua speco estas la “artlingvoj”. Oni faras ilin ne por plibonigi homan komunikadon, sed simple por ke ili estu belegaj en aŭ sono aŭ aspekto. Jen bona kaj grava celo fakte, kiun oni devas ne ignori, ĉar (almenaŭ laŭ la angla poeto KEATS) beleco estas la vero. En ĉi tiu speco troviĝas lingvoj kiel la du elfaj lingvoj de J.R.R. TOLKIEN (angla verkisto kaj filologo) kiujn li konstruis por siaj noveloj. En tiu speco estas la malpli konata (sed belega) verkaro de usona artisto STEVEN TRAVIS. Li konstruis sian principe simbolan lingvon *Tapissary* por aperi en lia arto. Eble ankaŭ apartenas la klingona lingvo, farita de lingvisto MARC OKRAND por aperi en la usona televidserio *Star Trek* kiel ekstertera lingvo.

Tamen mia artikolo temas pri la tria speco, kiu povus nomiĝi “sekretaj” lingvoj, sed fakte tiu frazo ne ĝuste klarigas la aferon. Tiajn lingvojn oni konstruas por multaj celoj: por komunikiĝi kun amikoj aŭ parencoj, por registri pensojn, aŭ simple por ĝui la prilaboron de lingvokreado. Mi mem konstruis tian lingvon: ĝi nomiĝas

Órgom Silawa, kaj oni povas vidi ekzemplojn kaj klarigojn en ĝia retpaĝo (vidu ligilojn sube).

En la bildo aperas malgranda ekzemplo de la lingvo: tradukaĵo de la unua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. En Esperanto la teksto estas:

“Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduki unu la alian en spirito de frateco.” La lingvo havas malgrandan vortostokon (nur preskaŭ 1000 vortojn)



sed tamen mi tradukis multajn mallongajn tekstojn kaj kelkajn longajn, kaj verkis en ĝi kelkajn originalajn poemojn kaj rakontojn. Neniu parolas ĝin; ĝi ekzistas nur kiel literatura lingvo.

Ankaŭ NASKano NIKO KALIVODA dum sia infanaĝo verkis lingvon nomitan *Aéstari*. Li kreis ĝin inter la jaroj 2001 kaj 2005, kaj ĝin parolas neniu (eĉ ne la aŭtoro), sed ĝi estas fikcie parolata en fikcia lando. Jen la sama ekzempla teksto en *Aéstari*:

Pändë anorpönöküim brî belio keá sa-niðë voibraküž keá länküž. Sî bhetöleg keáð bonan keá emersekü, keá maniiflä olai ándceiküam anamacküž dë trakest.

La lingvo havas grandan vortaron de ĉirkaŭ 3000 vortoj, kaj en ĝi ekzistas multaj tradukaĵoj kaj originalaj tekstoj.

Ĉu ankaŭ aliaj NASKanoj verkis proprajn lingvojn? Se jes, mi tre avide ŝatus vidi ekzemplojn kaj paroli pri la temo.

Ligiloj:

- <http://www.tapissary.com/>
- <http://orgom-silawa.blogspot.com>